La historio de Sidi Nonman

Por ĉi tiu fabelo estas uzata la tiparo *Saga,* desegnita de Franko Luin. La kajero estas unu en serio de fabelkajeroj prezentantaj la tiparojn de la sama desegnisto. Ili estas elŝuteblaj ĉe *www.omnibus.se/fabelaro.*

© 2002 Omnibus Typografi

OMNIBUS TYPOGRAFI
BOX 135 · SE-135 23 TYRESÖ · TEL. +46 8 742 83 36
franko@omnibus.se · www.omnibus.se

Mi ne priskribos detale ion rilate al mia naskiĝo, kiu ne estas sufiĉe eminenta por meriti atenton. Pri mia havaĵo, miaj gepatroj, per sia bona dommastrumado, postlasis al mi sufiĉe da mono por ke mi vivu kiel honestulo, sen ambicio, sed tute sendependa. Havante tiujn utilaĵojn, mi nur bezonis, por plenumi mian feliĉon, amindan edzinon, kiu povus kun mi partopreni ĉi tiujn bonaĵojn; sed tio estis benaĵo, kiun al Dio ne plaĉis donaci al mi; kontraŭe, estis mia malfeliĉo edziĝi kun virino, kiu, la tagon post nia edziĝo, strecis mian paciencon ĝis grado ne imagebla, krom por tiu, kiu jam suferis la saman ĉagrenegon.

En tiu tago, kiam estis preta nia tagmanĝo, konsistanta el diversaj manĝaĵoj, mi eniris la ĉambron, kie estis ordigita la tablo, kaj, ne trovinte tie mian edzinon, mi ordonis, ke oni ŝin alvoku. Atendiginte min longan tempon, fine ŝi venis. Mi kaŝis mian malpaciencon, kaj ni sidiĝis ĉe la tablo. Mi komencis ĉe la rizo, kiun mi manĝis, kiel kutime, per kulero. Mia edzino, kontraŭe, anstataŭ uzi kuleron, kiel faras ĉiu alia, eltiris el sia poŝo skatoleton, kaj elprenis el ĝi prenileton, per kiu ŝi premtenis la rizerojn, kaj ilin metis en sian buŝon grajnon post grajno.

Surprizita pri tia manĝmaniero, mi diris al ŝi: "Amina (tio estis ŝia nomo), ĉu vi kutimis tiamaniere manĝi la rizon en via familio, aŭ, ĉu vi tion faras pro tio, ke vi kutime tre malmulton manĝas? Aŭ, ĉu vi kalkulas la rizerojn, por ke vi manĝu ne pli en unu manĝhoro

ol en alia? Se vi tion faras pro la ekonomio, aŭ por lernigi min ne esti tro malŝparema, vi ne bezonas timi pro tio, ĉar mi povas vin certigi, ke ni ne tiamaniere nin malriĉigos."

Oni kredus, ke la aminda maniero, per kiu mi faris tiujn ĝentilajn admonojn, naskos ian komplezan respondon; sed ŝi, sen diri vorton, daŭrigis manĝi sammaniere. Fine, por ankoraŭ pli maltrankviligi min, ŝi nur iafoje manĝis rizeron; kaj, anstataŭ manĝi kun mi la aliajn viandojn, ŝi nur de fojo al fojo metis en la buŝon malmulte da panpecetoj, sed eĉ ne tiom, kiom manĝus pasero.

Sammaniere ŝi agis ĉe la vespermanĝo; kaj la postan tagon; kaj ĉiun fojon, kiam ni kune manĝis, ŝi tiel kondutis. Mi sciis, ke estas neeble al virino vivi per tiel malmulta nutraĵo, kiel ŝi manĝis, kaj ke ekzistas ia mistero, kiun mi ne komprenas. Tio do min decidigis ludi la rolon de ŝajnigulo. Mi ŝajnigis ne observi ŝian konduton, esperante, ke la tempo efikos la ŝanĝon, kiun mi deziris. Sed miaj esperoj estis vanaj, kaj pri tio baldaŭ poste mi konvinkiĝis.

Iun nokton Amina, kredante, ke mi profunde dormas, mallaŭte ellitiĝis, kaj, sin vestinte tre singardeme, por ke ŝi ne faru bruon kaj min ne veku, elpaŝis tre mallaŭte el la ĉambro, malfermis la stratpordon kaj eliris.

Mi malsuprenkuris al la pordo, kiun ŝi lasis duonfermita, kaj sekvis ŝin per la lunlumo, ĝis kiam mi vidis ŝin eniri tombejon proksime de nia domo. Gardante, ke mi ne estu vidata, mi iris al fino de la muro, kaj, superrigardinte ĝin, mi vidis Aminan kun vampirino.

Estas apenaŭ necese diri, ke la vampiroj estas malbelegaj estaĵoj — mi povus preskaŭ diri demonoj — kiuj vizitas la tombejojn, kaj manĝegas la freŝe enterigitajn kadavrojn; tial mi teruriĝis, vidante mian edzinon kun tiu vampirino.

Ili elfosis kadavron, kiu nur en tiu tago estis enterigita, kaj la

vampirino detrancîs pecojn de la karno, kiujn ili manĝis kune apud la tombo, interparolante tre trankvile dum sia abomena kaj nehoma manĝo. Sed mi estis tro malproksima por aŭdi ilian interparoladon, kiu verŝajne estis tiel stranga kiel ilia manĝo, kies rememoro ankoraŭ alportas al mi tremfroston.

Fininte tiun teruran festenon, ili reĵetis la restaĵon de la kadavro en la tombon, kiun ili plenigis per la tero elfosita. Mi lasis ilin okupataj en tiu laboro, rapidis hejmen, kaj, lasinte la pordon duonfermita, kiel mi jam ĝin trovis, eniris mian ĉambron, reenlitiĝis kaj ŝajnigis dormi. Baldaŭ poste Amina revenis, senbrue sin senvestigis, kaj ankaŭ reenlitiĝis, ĝojante, mi ne dubas, ke ŝi tiel bone kaj sekrete sukcesis.

Mia cerbo estis tiel plena de la barbara kaj abomena ago, kiun mi vidis, ke mi tre kontraŭvole kuŝis apud virino, kiu ĵus faris tian abomenaĵon; kaj estis longe ĝis mi ekdormis. Fine mi tamen trafis maldaŭran dormeton; sed, tagiĝe, je la unua alvoko al la komuna preĝo, mi vekiĝis, tualetis, kaj iris al la moskeo.

Post la preĝo mi promenis el la urbo kaj pasigis la matenon vagante sur la kampoj, pripensante, kion mi faros por devigi mian edzinon ŝanĝi sian vivmanieron. Mi formetis la perfortajn rimedojn, kiuj unue venis al mi en la penson, kaj decidis fari uzon de neseveraj rimedoj por venki tiun ŝian malfeliĉan inklinon; tiel meditante, mi revenis hejmen kaj alvenis ĝuste je la tagmanĝa horo.

Tuj kiam Amina vidis min eniri, ŝi ordonis, ke oni metu la tagmanĝon sur la tablon, kaj ni sidiĝis. Rimarkinte, ke ŝi persistas sammaniere manĝi la rizon grajnope, mi diris tute trankvile al ŝi: ”Vi scias, Amina, ke mi havis kaŭzon por surprizo, kiam en la unua tago mem post nia edziĝo, mi vidis vin manĝi la rizon po tia malgranda kvanto, kaj laŭ maniero, kiu incitus ĉiun alian edzon krom mi. Vi ankaŭ scias, ke mi nur diris al vi, ke tio min maltrankviligas,

kaj ke mi simple deziris, ke vi manĝu el la aliaj viandoj, kiujn mi poste ordonis, ke oni kuiru laŭ diversaj manieroj por plaĉi vian guston. Post tio, mi diris nenion plu, ĉar mi ne volis vin devigi; kaj mi tre bedaŭrus, se io, kion mi nun diras, maltrankviligus vin. Sed, diru al mi, Amina, mi vin petegas, ĉu la manĝaĵoj, metitaj sur mia tablo, ne estas pli bonaj ol mortintaĵo?"

Tuj kiam mi diris tiujn lastajn vortojn, Amina — kiu vidis, ke mi spionis ŝin je la antaŭa nokto — neimageble furioziĝis. Sub la perforto de sia kolerego, ŝi trempis la manon en pelvon da akvo, kiu staris proksime kaj, murmurante inter la dentoj kelkajn vortojn, kiujn mi ne povis aŭdi, ŝi ĵetis iom el la akvo sur mian vizaĝon, kriante furiozavoĉe: — "Mizerulo, ricevu la punon de via scivolo, kaj fariĝu hundo."

Tuj kiam Amina — kiun ĝis tiam mi ne opiniis sorĉistino — elparolis tiujn diablajn vortojn, mi tuj aliformiĝis en hundon. Mia mirego kaj surprizo je tia subita kaj neatendita aliformiĝo malhelpis al mi pensi pri mia sendanĝereco, ĝis kiam ŝi kaptis bastonon, per kiu ŝi komencis min bati tiel barbare kaj senkompate, ke mi miras, ke ŝi min ne mortigis. Mi esperis liberigi min de ŝia kolerego forkurante en la korton, sed ŝi persekutis min laŭ la sama furiozeco; kaj, malgraŭ mia tuta aktiveco, mi ne povis eviti ŝiajn batojn.

Fine, laca de la ĉaŝado kaj batado, kaj ĉagrenita, ke ŝi ne sukcesis min mortigi, kiel ŝi deziregis, ŝi elpensis novan rimedon por tion fari. Ŝi duonmalfermis la pordon por min mortpremegi per ĝi, dum mi, por savi la vivon, elkuros. Hundo, kiel mi estis, mi tuj ekkonis ŝian inferan intencon; kaj, ĉar la danĝero inspiras spiritĉeeston, mi, por eviti ŝian viglecon, tiel bone observis ŝian vizaĝon kaj agojn, ke mi kaptis okazon, kaj trakuris sufiĉe rapide por savi mian vivon kaj eviti ŝian malicon, kvankam ŝi per la pordo pinĉis la pinton de mia vosto.

La doloro, kiun mi suferis, igis min bojaĉi kaj kriegi dum mi laŭiris la stratojn; tio instigis al ĉiuj aliaj hundoj en la najbaraĵo elkuregi sur min, kaj kelkaj el ili min mordis; sed fine mi forkuris kaj rifuĝis en la butiko de homo, kiu vendis ŝafajn kapojn, langojn kaj piedojn. Unue la homo kompatis kaj protektis min, forpelante la hundojn, kiuj penegis enkuri en la domon.

Forpelinte la hundojn, li multfoje en la tago faris sian eblon por forpeli ankaŭ min el la domo, sed mi kaŝis min kaj vanigis ĉiujn lian penadojn. Sekve, malgraŭ li, mi pasigis la nokton en lia domo; kaj vere mi forte bezonis ripozon.

Sed por ne longe paroli pri negravaj detaloj, mi ne precizigos miajn malgajajn pripensojn pri mia metamorfozo, sed nur diros, ke mia gastiganto — elirinte la morgaŭan matenon por fari provizon da ŝafaj langoj kaj piedoj — malfermis, reveninte, sian butikon; kaj, dum li aranĝis siajn aĉetaĵojn, mi forŝteliĝis el mia angulo, kaj kuris inter kelkajn aliajn hundojn, kiuj, flarinte la viandon kiun portis mia gastiganto, sekvis lin en la espero, ke li ĵetos al ili iom da ĝi.

Mi ne restis longe kun ili, sed, laŭirinte la straton, haltis ĉe butiko de bakisto, kiu ĝuste en tiu tempo matenmanĝis; kaj, kvankam mi ne faris signon, ke mi ion petas, tamen li ĵetis al mi pecon da pano. Anstataŭ kapti ĝin avide kiel faras aliaj hundoj, mi lin rigardis, svingante la voston por montri mian dankon; ĉe tio li multe plezuriĝis kaj ridetis. Li permesis al mi resti proksime de la butiko. Mi sidiĝis kaj turnis min kontraŭ la strato por montri al li, ke mi nur deziras lian protekton. Tion li ne nur plenumis, sed per siaj karesoj kuraĝigis min eniri la domon, kion mi faris laŭ maniero, kiu montris, ke mi nur tiel agis laŭ lia permeso. Tio plaĉis al li, kaj li montris al mi lokon, kie mi povas kuŝi. Tiun lokon mi posedis kaj tenis tiel longe, kiel mi loĝis ĉe li.

Lia konduto al mi estis ĉiam malsevera; kiam ajn li matenmanĝis,

tagmanĝis aŭ vespermanĝis, li donis al mi porcion da nutraĵo; kaj, miaflanke, mi lin amis, kaj estis tiel fidela, kiel la dankeco de mi postulis. Mi ĉiam fiksis sur lin la okulojn, kaj li preskaŭ neniam lasis la domon, nek eniris en la bazarojn kaj vendejojn, se ne kun mi apud liaj kalkanoj. Mi estis tiom pli zorga pri mia konduto, pro tio, ke mi vidis, ke mia atenteco plezurigis lin; ĉar, kiam ajn li eliris tiel rapide, ke mi lin ne vidis, li ĉiam kriis "Ŝanco," kiu estis la nomo, kiun li al mi donis.

Mi jam loĝis iom da tempo ĉe tiu bakisto, kiam iun tagon virino eniris la butikon por aĉeti panon. Mia mastro — vidinte, ke ŝi donis al li pecon de falsa mono inter aliaj moneroj — redonis ĝin al ŝi, kaj postulis alian.

La virino rifuzis repreni ĝin, kaj certigis, ke ĝi estas bona. La bakisto ŝin kontraŭdiris, kaj dum la disputado diris al la virino, ke la monero estas tiel videble falsa, li estas certa, ke eĉ lia hundo povos distingi ĝin. Ĉe tio, li kriis: "Ŝanco, Ŝanco," kaj mi tuj saltis sur la butikotablon. La bakisto, ĵetinte la monon antaŭ min, diris: "Rigardu, kaj montru al mi, kiu el ĉi tiuj moneroj estas falsa?" Esplorinte ĉiujn monpecojn, mi metis mian antaŭpiedon sur la falsan moneron, kaj, rigardinte la vizaĝon de mia mastro, mi ĝin apartigis de la ceteraj por montri ĝin al li.

La bakisto, kiu alvokis min nur por moketi la virinon, tre miregis vidi min tiel rapide elekti la falsan moneron. La virino, tiel kulpigita, devis doni alian pecon anstataŭ la falsa.

Tuj kiam ŝi foriris, mia mastro rakontis al la najbaroj ĉion, kio okazis; kaj ili, dezirante observi mian lertecon, eniris la butikon, kaj, el ĉiuj falsaj moneroj, miksitaj kun aliaj, kiujn ili metis antaŭ min, ne estis unu falsa, sur kiun mi ne povis meti la piedon kaj apartigi de la malfalsaj.

La virino, siaflanke, ne forgesis diri al ĉiu kiun ŝi renkontis, tion,

kio okazis; kaj la rezulto estis, ke la famo de mia lerteco, disvastiĝis ne nur tra la najbaraĵo, sed tra la tuta kvartalo, kaj iom post iom tra la tuta urbo.

Mi havis tute sufiĉan okupon ĉiutage; ĉar mi devis montri mian lertecon al ĉiuj klientoj, kiuj venis al mia mastro por aĉeti panon. Malmultavorte, mia famo akiris por mia mastro pli da negoco, ol li povis elfari, kaj alportis al li klientojn el la plej malproksimaj partoj de la urbo; kaj ĉi tiu tajdo de bonsanĉo daŭris tiel longe, ke mia mastro konfesis al siaj najbaroj kaj amikoj, ke mi estas por li vera trezoro.

Iun tagon virino, altirita pro scivolo, venis, kiel venis aliaj, por aĉeti panon. Vidante min sidanta sur la butikotablo, ŝi ĵetis antaŭ min ses monpecojn, inter kiuj troviĝis unu, kiu estis falsa. Mi tuj apartigis ĝin de la aliaj, kaj, metante la piedegon sur ĝin, rigardis la vizaĝon de la virino, kvazaŭ por diri: "Ĉu mi ne estas prava?" La virino, rigardante min, respondis: "Jes, vi estas prava; ĝi estas falsa"; kaj, restinte iom da tempo en la butiko por rigardi kaj admiri min, ŝi fine pagis al mia mastro la panon, kaj, elirante la butikon, faris al mi signon, ke mi sekvu ŝin.

Mi ĉiam serĉis okazon por min liberigi de tiu stranga metamorfozo, kaj rimarkis, ke la virino min observis kun eksterordinara atento. Mi imagis, ke eble ŝi scias iom pri mia malfeliĉo kaj aliformigita stato, tial mi saltis de la butikotablo, kaj, ne vidite de mia mastro, mi sekvis la virinon, kiu pro tio ŝajnis kontentega.

Post kelka tempo, ŝi haltis apud domo, malfermis la pordon kaj, alvokinte min, diris: "Eniru; vi ne pentos, ke vi min sekvis." Post kiam mi eniris, ŝi fermis la pordon kaj kondukis min al sia ĉambro, kie mi vidis belan fraŭlinon okupata super brodaĵo. Tiu fraŭlino estis ŝia filino, kaj tre lerta magiistino, kiel mi poste eltrovis.

"Filino," diris la patrino, "mi kondukas al vi la faman hundon de

bakisto, la hundon, kiu povas distingi la malfalsan de la falsa mono. Vi scias, kion mi al vi diris rilate al tiu afero, kiam mi unue aŭdis pri ĝi, kaj ke mi opiniis, ke li estas homo, aliformigita en hundon per ia malica ensorĉado. Kion vi diras, filino, ĉu mi estas trompita en mia supozo?" "Patrino, vi ne estas," respondis la filino, kiel vi baldaŭ vidos."

La fraŭlino tuj leviĝis, ŝovis la manon en pelvon da akvo kaj, ĵetinte sur min iom da ĝi, diris: "Se vi eble naskiĝis hundo, restu tiel; sed se vi naskiĝis homo, reprenu vian antaŭan formon, per la povo de ĉi tiu akvo." En tiu momento la sorĉo estis rompita, kaj denove mi fariĝis viro.

Kortuŝita de dankeco per tia grandega servaĵo, mi ĵetis min ĉe la piedoj de mia liberigintino, kaj, kisinte la borderon de ŝia robo, mi diris: "Mia kara savintino, mi estas tiel sentema pri via treega kaj senparalela boneco al mi, kiu estas al vi plene nekonata, ke mi petas, ke vi mem diru al mi, kion mi povas fari por montri mian dankemon. Aŭ, prefere, disponu pri mi kiel via sklavo! Kaj ke vi sciu, kiu mi estas, mi rakontos al vi, per kiel eble plej malmultaj vortoj, mian historion." Post kiam mi finis mian rakonton, ŝi diris:

— "Sidi Nonman, ni ne parolu pri la ŝuldo, kiun, laŭ vi, vi ŝuldas al mi; sufiĉas al mi, ke mi iel helpis al tia honestulo, kia vi estas. Sed, ni parolu iom pri Amina, via edzino. Mi konatiĝis kun ŝi antaŭ via edziĝo, kaj mi scias, ke ŝi estas magiistiino, kaj ŝi ankaŭ scias, ke mi konas ion pri tiu arto, ĉar ni ambaŭ estis lernantinoj ĉe la sama instruistino. Mi tute ne miras pri ŝia malico; sed, tio, kion mi jam faris por vi, ne estas sufiĉa; mi finfaros, kion mi komencis. Vi devas ŝin puni, kiel ŝi meritas, reirante hejmen kaj prenante sur vin la aŭtoritaton, kiu al vi apartenas. Mi donos al vi la necesajn rimedojn. Interparolu iom kun mia patrino, ĝis kiam mi revenos."

La fraŭlino tiam eliris el la ĉambro, kaj revenante, ŝi tenis en

la mano malgrandan botelon. "Sidi Nonman," diris ŝi, "mi trovis per helpo de miaj libroj, ke Amina, en la nuna horo, promenas, sed baldaŭ ŝi estos hejme. Prenu ĉi tiun malgrandan botelon, iru tuj hejmen, kaj atendu en via propra ĉambro, ĝis kiam ŝi revenos. Tuj kiam vi vidos ŝin revenanta, kuru malsupren en la korton, kaj renkontu ŝin vizaĝon kontraŭ vizaĝo. Surprizite vin vidi tiel neatendite, ŝi turnos la dorson por forkuri. En tiu momento, zorgu, ke vi havu preta la botelon, kaj ĵetu sur ŝin iom da ĝia enhavo, samtempe sentime elparolante la jenajn vortojn: 'Ricevu la rekompencon de via malbonegeco.' Mi ne diros al vi plu; la efikon vi tuj vidos."

Post tiuj vortoj, mi diris adiaŭ al mia bonfarintino kaj ŝia patrino kaj iris hejmen.

Ĉio okazis, kion antaŭdiris la juna magiistino. Ne estis longe ĝis Amina revenis. Dum ŝi transiris la korton, mi renkontis ŝin kun la akvo en mano. Tuj kiam ŝi min vidis, ŝi kriegis, kaj kiam ŝi turniĝis por kuri al la pordo, mi ĵetis sur ŝin la fluidaĵon, elparolante la vortojn, kiujn instruis al mi la juna magiistino; kaj jen mia edzino momente aliformiĝis en ĉevalinon.

En tiu momento, ŝi restis senmova pro surprizo, tial mi kaptis ŝin je la kolharoj, kaj malgraŭ ŝia kontraŭbatalo, kondukis ŝin en la ĉevalejon, kie mi metis kolbridon sur ŝian kapon; kaj, alliginte ŝin al la fojnokrado kaj riproĉinte ŝin pro ŝia malnobleco, mi orde regalis ŝin per vipo ĝis mi laciĝis; kaj de tiam mi ŝin punas ĉiutage laŭ la sama maniero.

Fabelo el la kolekto ”1001 noktoj”.
Tradukis George Cox.

Omnibus